

STARTO

N-ro 4/2013 (249)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



foto: Oldřich Arnošt Fischer

Konferenco de ĈEA en Nymburk
Promeno tra la urbo kun ĉiĉerono

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz

Identec-numero (IĈ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: p/a Anna a Jiří Vyšinkovi, Kollárova 131, 696 42 Vracov, tel. 518 628 155, anjivy@seznam.cz

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: AEH, junulara, fervojista)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Vladimír Dvořák, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 999 091, vladimir.dvorak@esperanto.cz, (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

Vicprezidentino: Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, libuse.dvorakova@esperanto.cz (Muzeo de Svitavy, rilatoj al urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

Kasisto: Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz (membrodatumado, kontakto)

Komitatanino: Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavla.dvorakova@esperanto.cz (membroj, kluboj, sekcioj, konferencoj, informado, retaj projektoj, ekspozicioj)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. UPC 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

Komitatano: Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, tel. 608 224 993, miroslav.hruska@esperanto.cz (junularo, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio kaj UK-peranto: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

Revizia komisiono de ĈEA:

Prezidanto: Jan Řepa (Fidel), Na Valše 250, 38411 Netolice, fidel@razdva.cz

Věra Gavandová, Komenského 657, 789 61 Bludov, vgavandova@email.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 09 Pardubice, ludmila.srbova@seznam.cz

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer domo, Máchova alej 1, 568 02 Svitavy, direktorino: Blanka Cuhelová, tel. 461 532 704, cuhelova@muzeum.svitavy.cz.

Kontrollegis: Sabine Hauge, la komitato.

Konferenco de ĈEA

Nymburk, 25-28 oktobro 2013

En la Domo de Junularo kaj Hotelo de Faka Mezlernejo en Nymburk kolektiĝis kvindeko da partoprenantoj, inter ili gasto el Belgio, s-ro Marc Cuffez, prezidanto de FEL. Loĝado en la 9-a kaj 10-a etaĝoj donis belan panoramon de la urbo, kiam oni rigardis el la fenestro aŭ balkona galerio. En la 9-a etaĝo troviĝis ankaŭ klubejo, en la teretaĝo estis manĝejo kaj ofte vizitata trinkaĵ-aŭtomato. Tra vasta koridoro oni venis en la apudan domon, en kiu troviĝis la konferencujo kun libroservo kaj nia provizora bufedo en la vestiblo.



La vendredan programon komencis paroliga kurso en la klubejo sub gvido de Miroslav Malovec, kiu ne bezonis multe stimuli, ĉar la partoprenantoj estis sufiĉe babilemaj. Post vespermanĝo la programo estis daŭrigata en la manĝejo.

Komence oni rememoris antaŭnelonge forpasintajn K. Bartošík, J. Filip kaj precipe verkiston Ĉestmír Vidman, pri kiu oni aŭskultis radioelsendon de lia amiko, fama ĉeĥa deklamisto kaj favoranto de Esperanto Alfréd Strejček. M. Malovec prezentis novan libron de Otokar Březina *Moje matka – Mia patrino*, en kiu la plej fama poemo de la


poeto aperis en 14 lingvoj, almetita estas ankaŭ kompakta disko pri vidindaĵoj de regiono Vysočina en versioj ĉeĥa, esperanta kaj angla. Poste M. Smyčka deklamis la poemon en la originalo kaj en Esperanta traduko.

Petro Chrdle ofertis novaĵojn de sia eldonejo KAVA-PECH, ekz. la festlibron de Helmar Frank, la 6-an kajeron de *Esperantologio*, novan eldonon de la sukcesa porinfana romano pri junaj vikingoj *Arne, la ĉefido* de Leif Nordenstorm, kaj ankaŭ ĝian ĉeĥlingvan tradukon fare de Oldřich Arnošt Fischer *Arne, syn náčelníka* (ambaŭ librojn ilustris Pavel Rak).

M. Hruška prezentis kompaktan diskon (DVD) *Esperanto elektronike*.

Mallongaj filmetoj donis impresojn pri Islando, kie okazis la ĉi-jara UK. En aliaj videoj ne mankis intervjuo kun Mark Fettes, nova UEA-prezidanto, kiu volas precipe levi la membrobazon, ĉar kvin mil membroj estas malmulte, intervjuata estis ankaŭ esperantisto de la jaro 2012 Peter Baláž el Slovakio, kiu diris, ke li lernis Esperanton el la ĉeĥa lernolibro *Esperantem za tři měsíce* (Esperante post tri monatoj) kaj ke lia reta kurso *Lernu!* jam registris 167 000 personojn el la tuta mondo. La programon finis kantoekzerco por sabata vespero kaj filma fabelo por bona nokto.

La ĉefa konferenca traktado okazis sabate antaŭtagmeze. Bedaŭrinde ne venis la atendita urbestro, kiu akceptis aŭspicion pri la konferenco, tamen post aŭskulto de la eŭropa himno la konferenco komenciĝis. Pro respekto al la eksterlanda gasto oni parolis plejparte esperantlingve.





Al la klareco de eksplikado helpis granda ekrano, sur kiu estis projekciataj tabeloj, supervidoj, statistikoj ktp. La asocia prezidanto Vladimír Dvořák bonvenigis la partoprenantojn kaj resumis staton de plenumado de prioritatoj akceptitaj dum la kongreso en 2011. Pavla Dvořáková prezentis raporton pri la agado de la asocio dum la pasinta jaro de post la lasta konferenco en Břeclav.

La raporton kompletigis M. Hruška kaj M. Malovec per informoj pri stato de informkomunikiloj de ĈEA. La asocia kasisto klarigis la ekonomian situacion de la asocio kaj la staton de la membrobazo. Montriĝis, ke la asocio havas 550 membrojn, el kiuj nur 70 estas individuaj membroj de UEA, aliflanke ekzistas nialande multaj esperantistoj, kiuj ne membras en ĈEA, sed en aliaj organizoj (AEH, ĈEJ, Fervojistoj) aŭ gastas ĉe niaj kluboj aŭ sekcioj sen membreco. La mortintoj estis rememoritaj per minuto da silento.

Kiel kultura programero estis projekciita violonludo de J. Duda.

Ankaŭ la raporto de la kontrola grupo legata de Ludmila Srbová estis akceptita. Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio Petr Chrdle klarigis, kiel funkcias individua

membreco en diversaj kategorioj. Komitatanecon A ĉe UEA akceptis Miloš Bloudek, kiu la konferencon ne partoprenis. Sed li estis tiu, kiu en Rejkjaviko transprenis la premion Cigno por ĈEA.

Posttagmeze profesia ĉiĉerono gvidis nin promene tra la urbo. Unue li montris memortabulon de esperantisto-fervojisto Josef Šilhart (1875-1958), aŭtoro de *3300 bohem-esperantaj fakaj frazoj por fervojistoj kaj vojaĝantoj*. Dua halto estis ĉe la gimnazio, kie ĵus finiĝis la politikaj balotoj. La historia gimnazio konserviĝis en la origina aspekto ankaŭ interne kaj ĝis nun estas uzata por sia origina celo, nome instruado de junularo.



Kiam ni alvenis al negranda placo, la ĉiĉerono montris al ni domon kun reliefo pri historia alveno de la reĝidino Elizabeta Primislidino al Nymburk, kiam ŝi forkuris surĉevale el Prago antaŭ malamikoj. Li sciis ankaŭ bele rakonti pri dekadencan poeto Jan z Wojkowic, propranome Jan Nebeský (1880-1944), kies memortabulon ni trovis sur la muro de unu el la domoj.

Eble plej impresiva vidindaĵo estis la resto de mezepokaj urbaj muregoj, inter kiuj kaj rivero estis promenejo kun centoj da ripozantaj homoj kaj multaj biciklantoj. En proksima rivereto naĝis familioj de sovaĝaj anasoj kaj ankaŭ kojpoj (ĉeĥe *nutrie*), kiuj kuraĝe almozpetis karoton de promenantaj homoj. Proksime ni atingis preĝejon de Sankta Egidio kaj la promeno finiĝis en la placo ĉe malnova urbodomo. Revenante al la hotelo ni ankoraŭ vidis monumentojn omaĝe al Božena Němcová kaj Jan Hus.

Antaŭ la vespermanĝo ankoraŭ okazis paralele paroliga rondeto, filmprojekciado kaj prezento de Esperanto-retejoj kaj renkontiĝo de Esperanto-instruantoj. Tiuj diskutis, ĉu havus sencon restarigi la asociajn ekzamenojn kaj la pedagogian sekcion aŭ kiel oni instruas Esperanton al infanoj.

Dancvesperon inaŭguris dancgrupo de pliaĝuloj per vakeraĵoj, kiujn ni jam vidis antaŭ tri jaroj en Poděbrady, ili dancis laŭ registrita muziko, sed poste venis kantisto, kiu kantis akompanante sin mem per elektronika aparataro. Surpodie prezentiĝis per du kantoj ankaŭ improvizita koruso el inter la partoprenantoj. Multe da amuzo liveris tombolo, precipe la ĉefa premio, kiu estis pafmortigita fazano kun kompleta plumaro. Gajnis ĝin V. Hirš. Dancado estis finita per ĉ. unuhora komuna kantado kun gitaro en la klubejo."

Dimanĉe matene la jarkunveno estis daŭrigata. V. Hirš montris proponon de nova asocia legitimilo, pri kiu leviĝis vigla diskuto, Jaroslav Liška prezentis domojn en la urbo Prostějov, kie okazos la venontjara asocia kongreso, elektita estis elekta komisiono el tri iamaj asociaj prezidantoj (Podhradská, Melichárková,

Chrdle), Josef Vojáček parolis pri siaj kursoj en Masaryk-universitato, Josef Hron pri sia reta vortaro.

Post paŭzo la partoprenantoj dividiĝis je 3-5 membraj grupetoj kaj certan tempon komune pridiskutis iun aktualan movadan temon elektitan el inter slipetoj. La grupestroj notis la plej interesajn ideojn kaj ĉefajn konkludojn kaj proponojn laŭte resumis. La skribaj respondoj estis kolektitaj kaj estos poste prilaboritaj kaj disponigitaj al la membraro.

Posttagmeze triopa grupeto forvojaĝis al Poděbrady por konatiĝi kun la urbo, dum grupo de dudek homoj forveturis per aŭtoj al la kastelo Loučeň, kie Pavla Dvořáková esperantigis la klarigojn de la ĉiĉerono. Poste ni vizitis kelkajn labirintojn en la kastela parko.

La dimanĉan vesperon komencis M. Smyčka per ĥoralo Sankta Venceslao omaĝe al la ĉeĥa ŝtatfesto. Poste li deklamis tekston "Maljuna arbo" el *Interparoloj kun TGM*. Li rememorigis centjarajn jubileojn de Š. Urban kaj J. Mařík laŭ prelegtekstoj senditaj de prof.

Novobilský. J. Drahotová rakontis pri sia tradukado de la libro *Bona Espero* al la ĉeĥa lingvo kaj oni spektis parton de la filmo de R. Dobrzynski *Ora Bona Espero*. La belga gasto klarigis situacion en Belgio. Honore al la belga gasto P. Dvořáková kantis sian muzikigon de la poemo de C. Piron "Sufero de l' aliaj", premiitan en 1952 ĉe Belartaj Konkursoj de UEA. Anstataŭ fina fabelo M. Hruška projekciis humuran televidan skeĉon, kiun li subtekstigis esperante. La vesperon oni finis per ĉ. unuhora kantado ĉe gitaro.



Lunda antaŭtagmezo estas dediĉita al komputila konsultejo en la klubejo sub gvido de Miroslav Hruška kaj samtempe al tradukado kaj interpretado de ĉiĉeronaj tekstoj en la manĝejo sub gvido de Pavla Dvořáková. Tagmeze la konferenco finiĝis.

Posttagmeze kunsidis ankoraŭ la asocia komitato.

*Miroslav Malovec
fotoj Oldřich A. Fischer*

Rezoluce

Konferenco -

1. schválila zprávu o činnosti za uplynulé období
2. vzala na vědomí informaci o stavu členské základny
3. schválila zprávu o hospodaření v r. 2013
4. schválila zprávu RK za léta 2011 a 2012 s tím, že zprávu RK za r. 2011 nelze odpovědně vypracovat
5. vzala na vědomí volbu M. Bloudka za člena výboru UEA a Vl. Dvořáka za člena Asemblea EEU
6. schválila konání kongresu v Prostějově ve dnech 24.-26.10.2014, ve spolupráci s místním klubem a s hlavním ubytováním v internátu Palečkova 1
7. zvolila 3-člennou volební komisi ve složení: P. Chrdle, V. Podhradská a J. Melichárková
8. vzala na vědomí změnu právního stavu a schválila přechod ČES mezi spolky od 1.1.2014
9. schválila novou podobu dvojjazyčné legitimace ČES a rozhodla, že legitimace bude zaslána minimálně na tvrdém papíře všem novým členům zdarma a po výzvě na webu a ve Startu i dalším zájemcům za úhradu nákladů zhotovení i poštovního
10. vzala na vědomí podpis smlouvy o spolupráci s právně samostatnými kluby v Prostějově a v Pardubicích

Český esperantský svaz



Ĉeĥa Esperanto-Asocio

<http://esperanto.cz>



Průkaz člena č.:

9872

Membrokarto n-ro:

František Lejzerovič Hovorný

Datum narození: 21.10.1949

Naskiĝdato:

Členem od roku: 1989

Membro ekde la jaro:

Podpis předsedy / Subskribo de la prezidanto

La konferenco akceptis novan membrokarton, kiu estos dissendata al ĉiuj novaliĝintoj.

Ĉiu, kiu pasintecce ricevis la malnovan kaj volas ricevi ankaŭ la novan, havas je dispono 2 vojojn:

a) aliĝi ĉe nia kasisto V. Hirš ĝis 15.2.2014 kaj pagi 20 Kč same kiel novuloj (por presi kaj sendi kiel ordinaran poŝtaĵon)

b) sur aliĝilo por la kongreso 2014 streki, ke vi deziras ricevi ĝin, kaj transpreni ĝin kune kun ceteraj materialoj kiel donaceton dum la kongreso en oktobro 2014

La membrokarto mem estos en plasta kovrilo. Tamen por ŝpari kostojn ni devas la mendojn grupigi, sed ni proponas almenaŭ la du vojojn kiel ilin ricevi.

Ĉu enmeti ankaŭ akademiajn titolojn oni mem decidas en la postulo.

Krome ekzistas ankaŭ nova aliĝilo por la asocio publikigita en la asocia domajno www.esperanto.cz en la rubriko "Organizace".

Ĝisnuna plenumado de la prioritatoj el la kongreso en Ŝumperk 2011

Ĉi-artikole mi volus resumi dujaran ĝis-momentan plenumadon de la prioritatoj starigitaj de la nova estraro dum la kongreso aŭtune 2011. Ĉefe ne pro tio, ke venontjare okazos novaj balotoj kaj mi volus fanfaroni, sed pli, ĉar foje taŭgas retrorigardi kaj pripensi kiom kaj kial ankoraŭ mankas.

Ĉio krome estu instigo por vi – membroj de ĈEA – ĉu en iu sfero vi povus kaj volus engaĝiĝi, ĉar sen via aktiva kontribuo la estraro sukcesos fari mal-multon.

1. Financa stabiligo kaj iom-post-ioma transiro al ekvilibrigita budĝeto

Verŝajne plej sukcesa parto, ĉar post nur-nuraj du jaroj oni tute renversis pasivan budĝeton kaj eĉ akiras profitojn.

Ni forigis grandan historian ŝarĝon sendi nian gazeton Starto al ĉiuj membroj sendepende, ĉu ili deziras ĝin aŭ eĉ tute interesiĝas pri la movado. Dank' al tio ke nun historie dumvivaj membroj devas anonci ĉiujare sian aktualan adreson, la eldonkvanto de Starto malaltiĝis je ĉ. 200 ekzempleroj. Krome la nova kotiza regularo nun donas al ĉiu eblecon elekti ĉu li/ŝi deziras presitan surpaperan Starton aŭ ĉu sufiĉas aliro al la reta eldono.

Krome multe helpis malfacile ripet-eblaj cirkonstancoj kiel tre sukcesa Tri-landa konferenco en Břeclav, ricevo de la premio el Fondaĵo Cigno aŭ malavaraj mondonacoj. Ĉio ĉi tutcerte ne ofte ripetigis, sed tendenco al ekvilibrigita budĝeto estas klara sendepende de la unufojaj okazaĵoj.

Plu daŭras ŝparado en du gravaj teritorioj – nome en ekonomia mastrumado, kiun nia kasisto V. Hirš plenumas tute senpage, kaj due Libroservo, kiu plejparte estis senpage stokita ĉe geedzoj Vyšinka kaj nun iom post iom estas transportata al nia deponejo en Svitavy, en kiu estas nia sidejo de ĈEA. Ĝi restas laŭ la kontrakto sen lupago, kvankam memkompreneble ni havas pluajn elspezojn por nia Esperanto-muzeo kaj ekspozicioj en ĝi kiel videblas en la ĉiujara budĝeto.

2. Aktualigo kaj kompletigo de la datumado kaj kluboj/sezioj

Iom post iom aldoniĝas pluaj retadreso (ĉ. 50), kion la estraro konsideras plej konvena kaj senkosta maniero por kontakti.

Ni starigis enketon por la kluboj kaj sezioj kaj dank' al tio nun ekzistas retkontaktoj al preskaŭ ĉiuj kluboj/sezioj, kiuj krome prezentis pluajn informojn pri siaj reprezentantoj kaj kunvenoj, kio aperas sur la ĈEA-retpaĝaro. Nelastvice fine oni nun pli orientiĝas en jura problemaro, kiu klubo fakte posedas juran memstarecon.

Ekde la kongreso en 2011 ĈEA i.a. subskribis kontraktojn pri kunlaboro kun jure memstaraj E-kluboj en Svitavy, Prostějov kaj Pardubice.

La estraro aprobis novan organizan regularon por la katolika sezio kaj servis kiel tegmento por la subvencio por la klubo en Přerov.

Antaŭnelonge aperis nova aliĝilo por ĈEA kaj nova aprobata legitimilo.

Nun dependas de la unuopaj kluboj/sekcioj, ke ili ĉiujare post siaj kunvenoj sendu novan aktualigon laŭ la formo de la komenca enketo por teni la informojn freŝaj.

Pavla Dvořáková, kiu transprenis kontaktojn kun kluboj/sekcioj, kredas, ke venontjare ŝi kapablos pli okupiĝi pri konkreta kunlaboro kun kluboj kaj unuopuloj, ĉar la konferenco aprobis rezigni venontjare pri subvencia sfero, kiun ŝi garantiis. Ĉi-jare ŝi strebis viziti almenaŭ kelkajn (ekz. Svitavy, Olomouc, Praha, Pardubice),

3. Aktivigo kaj klerigado de la membrobazo (lingva, reta)

La ĉefa aranĝo por interŝanĝi opiniojn kaj ion eklerni estis sendube Trilanda konferenco en Břeclav en septembro 2012.

La ĉi-jara konferenco en Nymburk pro diversaj kialoj (espereble ĉefe balotoj) suferis pro malpli alta partopreno, sed tiel oni havis pli da tempo por interkonatiĝi, interparoli kaj kleriĝi (ekz. en prikomputilaj programeroj gvidataj de M. Hruška aŭ interpretado de turismaj tekstoj sub gvido de P. Dvořáková).

El pure kleriga kaj informa vidpunktoj tucerte plej granda estis Vikimano en oktobro 2011, kiu pro la temo mem allogis multajn amaskomunikilojn. En septembro 2013 oni festis la 5-jariĝon de la Esperanto-muzeo kune kun la 80-jariĝo de Esperanto en Svitavy, en kies kadro oni traktis kelkajn klerigajn programerojn.

Ĉiujare okazadas lingva seminario en Skokovy, kiu ĉi-jare kuniĝis kun faka Sabla printempo (dediĉita precipe al voĉregistrado) kaj al kiu la estraro aljuĝis subvencion por kovri parte kostojn

de la lektoroj, ĉar ni konsideras ĝin ĉi-momente la ĉefa aranĝo en Ĉeĥio por lingva kaj faka klerigado kaj volas apogon daŭrigi.

Sur la ĈEA-retpaĝaro krome funkcias komputila konsultejo gvidata de M. Hruška kaj lingva kaj literatura rubriko prizorgata de M. Malovec.

4. Strebado engaĝi en subvenciaj projektoj ekz. por malpliaguloj aŭ gejunuloj

Kontraŭvole post balotoj la taskon transprenis Pavla Dvořáková, ĉar neniu pretis, kvankam ni turnis nin al kelkaj membroj kaj eĉ esperantistoj ekster ĈEA. Ĝis nun tiu ĉi pozicio vakas kaj neniu projekto finaliĝis (kvankam Pavla pretigis bazajn pristudojn), ĉar pro laboraj kaj familiaj taskoj ĉesis labori L. Hýblová kaj Pavla devis transpreni ankaŭ ŝian laboron.

Krome Pavla devis diligente kaj dum multa tempo dediĉi sin al nia partopreno en la konkurso de la Fondaĵo Cigno, kie ni vidis ŝancon sukcesi, ĉar ja oni multon publikigis en ĉeĥaj amaskomunikiloj pri Esperanto kaj ties movado kaj aktivado. Fine ĈEA rikoltis kaj nia projekto venkis kaj estis premiita (per sumo de ĉ. 40 000 CZK), kio i.a. alportis kroman grandan kontribuon al nia budĝeto.

Kvankam ĈEA oficiale partoprenis nenium alian subvencian projekton, ĝi ricevis en lastaj du jaroj de la membroj aŭ de anonimuloj signifajn donacojn, aŭ sen konkreta difino aŭ por konkretaj celoj. Al ĉiu donacinto ĈEA dankas kaj mi nur ripetas la dankon ankoraŭfoje sen prezenti ĉiujn nomojn. Tio vere multe helpas al ni teni ekvilibrigitan budĝeton kaj subvencii kelkajn projektojn, ĉar diversaj kostoj pli kaj pli kreskas.

Se iu el vi konsideras tiun ĉi teritorion proksimam al vi kaj volus helpi al nia tuta movado, senhezite skribu al la estraro pri viaj ideoj kaj eblecoj! Alikaze la estraro pro aliaj prioritatoj rezignos por venonta jaro pri tiu ĉi grava parto, kiel mi anoncis dum la ĉi-jara konferenco.

5. Kreado de komisionoj/grupoj kun klara koncepto

Modele aktivas ĉ. 10-membra Muzea kaj ekspozicia grupo sub gvido de Libuše Dvořáková. Ŝi ankaŭ kiel prezidantino de la loka klubo zorgas pri la ĉiutaga muzea vivo, dum la ekspoziciojn estras Pavla Dvořáková, sub kies prizorgo krome cirkulas la migra ekspozicio pri Esperanto, ekinta en Písek kaj vizitinta ekde oktobro 2011 pliajn 14 urbojn tra la tuta lando.

M. Malovec kun V. Türk kaj kelkaj aliaj unuopuloj diligente laboras pri ciferecigado de esperantaj materialoj.

Pli malpli stagnas aktivado de la pedagogia grupo. La plej granda sukceso estas daŭrigo de oficialaj Esperanto-kursoj en Masaryk-Universitato gvidataj de J. Vojáček. Krome komenciĝis esperdona traktado iniciatita de Viktor Dvořák en Ministerio pri klerigado koncerne envicigon de Esperanto inter devige elekteblaj duaj fremdlingvoj en ĉeĥaj bazlernejoj.

Komputilajn aferojn prizorgas ĉefe gejunuloj ĉirkaŭ Miro Hruška kaj menciinda estas Aleš Tomeček zorganta pri la teknika parto de nia retejo.

Bedaŭrinde mankas grupo pri subvencioj kaj ankaŭ pri tradukado. Koncerne kontribuadon al Vikipedio plej elstaras J. Hron, kiu ankaŭ ellaboris novan version de sia granda interreta vortaro (elŝuteblan en www.esperanto.wz.cz).

6. Uzado de modernaj teknologioj ekde retmesaĝoj ĝis interreto

La estraro mem klopodas plene eluzi modernan kaj senpagan teknikon por sia agado kaj intertraktado ekde retmesaĝoj ĝis skajpado. Sekve ĝi kunvenas nur dufoje en la jaro, kio ŝparas niajn komunajn rimedojn. Ĝi krome kompletigas liston de la membraj retadreso kaj ĉiam alvokas siajn anojn aliĝi kaj profiti de tia rapida komunikado. Tamen parte la laboron bremsas aĝlimoj kaj ĝisnunaj kutimoj. Ekzistas ebleco aliĝi kaj utiligi unuecan adresaron ĉe @esperanto.cz, kiu servas ne nur por la estraro kaj kluboj/sekcioj. Pliaj homoj abonas senpagan informilon Retkomunikoj (en la lasta jaro la kvanto altiĝis ekde 298 ĝis 400).

7. Projektoj de Esperanto-Muzeo en Svitavy

Kvankam lastvice menciita, temas sendube pri la plej ampleksa kaj sendube ankaŭ plej sukcesa agadsfero de ĈEA.

Buntaj aktivecoj okazas dank' al subteno de la urbo kaj laboremo de volontuloj precipe el la loka klubo kaj el la muzea grupo de ĈEA.

Krom akcepto de individuaj kaj grupaj gastoj en la muzeo okazas pluraj Esperanto-aranĝoj: juniaj Muzeaj noktoj kun bunta programo kaj inaŭguro de la ekspozicio (ĉi-tempe „Esperanto kaj muzoj“), Infana tago, Tago de malfermitaj pordoj, Marcipana Kristnasko k.a.

Ĉiujare okazadas unu plurtaga internacia aranĝo (Vikimania en novembro 2011, OSIEK-Konferenco en julio 2012, KELI-Kongreso en 2013).

Altiĝis ankaŭ kvanto de neesperantaj aranĝoj (ne nur vojaĝprelegoj) okazintaj en la muzea ejo.

En la biblioteko dank' al M. Ĉumová estas katalogitaj jam pli ol 14 000 bibliotekaj unuoj. Muzea komputilo estis kompletigita je novaj multkomunikilaj libere elŝuteblaj dosieroj, vigliĝis la muzea retejo, internaciaj kontaktoj kreskas i.a. pro la Ipernity-paĝo. Okazis internaciaj kontaktoj kaj librinterŝanĝoj kun IHC Herzberg, GEA-Biblioteko Aalen, Nacia Esperanto-Muzeo en Gray k.a. Pri la muzeaj aktivecoj aperis pluraj informoj en la distrikta gazetaro kaj televido.

Eblas vidi, ke ekzistas jam multaj pri-semitaj kampoj, dum aliaj bedaŭrinde iom stagnas kaj sur ceteraj mankas almenaŭ kunordigantoj.

Nia devizo tamen restas sama:

ASOCIO NE EGALAS AL LA ESTRARO.

Dependas ĉefe de vi kaj de viaj eblecoj kiom da grundo ni komune kapablos kultivi. Mi komprenas, ke ekzistas nuntempe multaj baroj – tempo, laboro, vivkondiĉoj aŭ sano kaj multo alia kaj mi plene respektas se vi ne povos engaĝiĝi. Memkompreneble nur per via membreco kaj kotizpagado vi sendube helpas al ĈEA.

Tamen se iu trovis por si mem ion utilan, kie li/ŝi volus partopreni, ne hezitu anonciĝi ĉe la koncernaj gvidantoj. Se vi eĉ volas priokultivi novan teronon, la estraro volonte aŭdos pri viaj ideoj.

Post unu jaro finiĝas nia oficperiodo kaj neni el ni pretendas al si resti en sia funkcio. Ju pli da ideoj, opinioj kaj proponoj, des pli bone por Esperanto en Ĉeĥio.

En la fino mi povus ripeti samajn vortojn aperintajn en Starto antaŭ du jaroj: Pro multaj cirkonstancoj ne atendas nin facila tempo kaj nur komune ni povas

montri, ke ni scias transvivi kaj ankaŭ ion oferti al cetera mondo. Mi kredas kaj esperas, ke ĉiu ĈEA-ano trovos teronon, kiun li/ŝi ĝuos kaj alportos utilon kaj prosperon por aliaj.

Antaŭdankas
Vladimír Dvořák, prezidanto

P.S.

Ĉi-artikole mi resumas miaokule nur prioritatojn prezentitajn dum la kongreso 2011 kaj ties ĝisnunan plenumadon.

Kompleta agadraporto por 2013 kun raporto pri mastrumado, budĝeto kaj propono de aktivecoj por 2014 aperos en Starto 2014/1.

La raporto ankaŭ mencias atingajojn surkampe de ZEOj, kluba vivo, projekto Fonoteko, kulturaj akribejoj - inkl. prezentiĝon de R.U.R. dum UKo en Rejkjaviko k.a.)

Ekskurso en Loučeň kaj libroservo en Nymburk



fotoj P. Chrdle, O.A. Fischer

Du datrevenoj

En la tagoj 27 – 29 septembro 2013 okazis en Svitavy duobla soleno: **80 jaroj de loka klubo kaj 5 jaroj de Esperanto-muzeo.**



La vendreda vespero post alveturo de partoprenantoj estis dediĉita al prelego de Ján Vajs pri ekspedicio al Antarktido (en la muzeo) kaj Petro Baláž kun Petro Chrdle prezentis siajn novajn eldonaĵojn. Okazis la lasta prezento de la spektaklo *R.U.R. aŭ Terura sonĝo* laŭ Karel Čapek (en la teatro Trám). Venis ankaŭ multaj neesperantistoj.



La inaŭguro de la soleno okazis sabate je la 9-a horo en la muzeo kun ĉeesto de la urbestro David Šimek kaj direktorino

de la urba muzeo Blanka Čuhelová, kiuj ambaŭ laŭdis la laboron de lokaj esperantistoj same kiel ĈEA-prezidanto Vladimír Dvořák. Petro Chrdle voĉlegis salutojn de eksterlandaj esperantistoj (ekz. H. Tonkin) kaj poste L. Dvořáková pri-skribis la historion de Esperanto en Svitavy inkluzive de fondo de Esperanto-muzeo. Poste P. Dvořáková projekciis kaj prikomentis buntajn aktivecojn de la Muzea grupo en Interreto.

Partoprenis ankaŭ gastoj el Aŭstrio, junulino el Pollando kaj pluraj slovakoj.



El la muzeo ĉiuj foriris al proksima parko, kie estis senvualigita nova Esperanto-arbo (fago ruĝfolia) kun memorŝtono. La vualon kune demetis la urbestro D. Šimek kaj la kluba prezidantino L. Dvořáková. Sur la foto estas loka klubo teamo.





Posttagmeze en la urba muzeo estis inaŭgurita ekspozicio de Ján Vajs „Pintoj de Eŭropo“ (sur ĉiu monto lia foto kun Esperanto-flago). Kelkaj fotoj estis ankaŭ de P. Baláž.



En la prelegejo de la ekspoziciejo estis priskribita ne nur la ekpozicio mem, sed ankaŭ impresoj el Rejkjaviko kun lum-bildoj.



La vesperon fermis dancamuzo kun tombolo.



Dimanĉe okazis plua libroprezento, post kiu sekvis lingva seminario pri tradukado de turismaj tekstoj en Esperanton kaj atentigis pri plej oftaj eraroj.

Posttagmeze kunsidis la asocia komitato.

Pri la festo ekzistas filmeto en interreto

<https://www.youtube.com/watch?v=Tk9rxTCRqfo>

Post komuna fotado antaŭ la kulturdomo Fabrika.

-mm-

fotoj J. Hron

Kopřivnice



La 12-an de septembro 2013 en Kopřivnice estis malfermita ekspozicio „Ĉu Esperanto estas morta lingvo?“, kiu origine ekestis en Písek kaj kiu jam gastis en dudeko da lokoj. Ĝi estis kompletigita per ekspozicio „Esperanto en Kopřivnice“. La ekspozicio troviĝis en la muzeo „Fojtství“ (Voktejo) ĝis la 13-a de oktobro 2013.



La ekspozicion malfermis Libuše Dvořáková el Svitavy kaj donis intervjuon por loka gazeto. Miroslava Tomečková deklamis poemojn por kompari Esperanton kaj la ĉeĥan. Esperantismon kaj skoltismon en Kopřivnice fondis Rudolf Zanáška (1907-1954), tial la inaŭguron partoprenis ankaŭ lia vidvino, vivanta nun en Nymburk.

La sekvan tagon en la skolta centro Vanaivan estis restarigita monumento „Zátiší Dra Esperanto – Ripozejo de D-ro Esperanto“. La monumenton prizorgis R. Zanáška en septembro 1950, sed posta konstruado de nova loĝkvartalo ĝin forigis. Lokaj skoltoj sub gvido de Kyštof Hyvnar antaŭ kvin jaroj trovis en arbaro ŝtonon, sur kiu restis spuro de iam fiksita memortabulo.



Post esplorado ili konstatis, ke temas pri la menciita monumento. Ili proponis kunlaboron al nia asocio, kiun plenumis niaflanke Jiří Tomeček. Komune ili elspionis, ke la memortabulon savis Roman Michna (1915-2003) el proksima vilaĝo Lichnov. Liaj parencoj volonte disponigis la tabulon por renovigo de la monumento.





La monumenton senvualigis František Frýbert, esperantisto kaj iama skolto. Apud la ŝtono estis plantita Kverko de Konkordo simbolanta kunlaboron de skoltoj kaj esperantistoj. Pri la ŝtono aperis raporto en loka televido.

*Laŭ L. Dvořáková
fotoj Jiří Tomeček*

Jaroměřice

La 14-an de septembro 2013 en Jaroměřice nad Rokytnou okazis omaĝo al poeto Otokar Březina (1868-1929) kun prezento de nova esperantlingva libro. En la muzeo de la poeto kolektiĝis liaj admirantoj, inter ili kvar esperantistoj (Margit Turková, Viktor kaj Libuše Dvořák kaj Miroslav Malovec).

La soleno komenciĝis ĉe la tombo de la poeto en proksima tombejo. Post spirita kanto de lokaj korusanoj parolis poeto Jiří Kuběna, ĉefe pri la eksterordinara modesteco de la Majstro. En la muzea biblioteko poste okazis mallonga diskuto pri Esperanto-tradukoj, kies manuskriptoj troviĝas en la libroŝranko. La novan libron akceptis ankaŭ la urbestro el proksima urbo Moravské Budějovice. Jiří Kuběna poste solene metis novan

simbolan ŝtonon sur la bedon de rokplantoj en la ĝardeno.

La programo estis daŭrigata en proksima restoracio Viola, kien venis ankaŭ enlande fama aktorino Gabriela Vránová. En la ĝenerala asembleo de Societo Otokar Březina estis tralegitaj raportoj pri agado kaj mastrumado kaj estis prezentita nova libro *Moje matka – Mia patrino*. La plej fama poemo de la poeto aperis tie en du originalaj variantoj (1895, 1933), en tri esperantlingvaj tradukoj (S. Schulhof, J. Kořínek, J. Krolupper) kaj en 12 aliaj lingvoj. En la libro estas ankaŭ kompakta disko pri vidindaĵoj de Regiono Vysočina (tiun sponsoris energetika entrepreno Skupina ČEZ). La libron preparis Viktor Dvořák kaj Miroslav Malovec.

Unue Margit Turková voĉlegis du strofojn el la traduko de J. Krolupper, poste deklamis G. Vránová plurajn poemojn de Březina en la ĉeĥa originalo. Poste ŝi klarigis, ke ŝi interŝanĝas retmesaĝojn kun esperantisto Václav Stibůrek, kiu ŝin invitis deklami esperantlingve, sed ŝi ne povus bone prezenti poezion en fremda lingvo. Fine estis invititaj V. Dvořák kaj M. Malovec, kiuj alterne legis tekston pri la estiĝo de la libro. Pluraj homoj poste venis al ilia tablo peti subskribojn en la libro, kelkaj volis ankaŭ informojn pri Esperanto.



Polička

Sabate la 9-an de novembro 2013 la klubo de Esperanto-Amikoj en Svitavy aranĝis renkontiĝon en la proksima urbo Polička (naskiĝloko de komponisto Bohuslav Martinů). Malgraŭ malbona vetero alveturis 20 esperantistoj el 11 urboj aŭ vilaĝoj. Antaŭtagmeze s-ro Antoŝ ĉiĉeronis tra plej granda loka entrepreno Ravensburger Polička, kiu produktas puzlojn kaj diversajn infanludilojn, kiujn ĝi eksportas al la tuta mondo. Ĉi-jare estis funkciigita nova plastomodlejo, tre aŭtomatigita, kvankam manlaboroj ankaŭ restis.



Posttagmeze s-ino Anna Dobešová rakontis pri Finnlando, kie ŝi vivis dum sia pli ol 20-jara edzineco. Ŝi amas la landon kaj plezure tien revenas. La lando posedas 60 mil lagojn kaj interesajn tradiciojn. Ekz. la ferioj komenciĝas jam la 1-an de junio, la duan dimanĉon en novembro finnoj festas Tagon de Patroj, ĉefa Kristnaska floro estas hiacinto, dum festotagoj estas fermitaj eĉ supermagazenoj, ne veturas publika trafiko kaj ĉie flagras flagoj. En la okcidenta parto la stratoj kaj vendejoj havas nomojn en la finna kaj en la sveda.

*Libuše Dvořáková
foto Oldřich A. Fischer*


Bartošovice

16.-20.10 2013

Denove post unu jaro, alveturis en vilaĝon Bartošovice en la Moravia-Silezia regiono 40 geesperantistoj el 5 landoj: Slovakio, Pollando, Hungario, Turkio kaj Ĉeĥio, por renkontiĝi kaj komune ekzerci Esperanton.



En la ornamitaj ejoj de la kastelo bonvenigis nin infanoj el loka lernejo per kantoj en Esperanto. Amuzon malfermis slovakoj per ĉardaŝo, oni daŭrigis per danckantoj pri ĉiuj landoj kaj ĉeĥoj finis per polko. Poste atendis nin riĉa programo.



Ĵaŭde ni vizitis savstacion kaj centron de ekologia edukado, se diri pli bone: malsanulejon por forlasitaj bestoj. Ni vidis cikoni-ojn, aglojn kaj korvojn kun vunditaj flugiloj, rompigitaj piedoj aŭ brulvunditaj de alta elektotensio, kiuj jam ne plu povos reveni en la naturon. Sian kaŝejon ĉi tie trovis ankaŭ malgranda lutro, kiun ni povis karesi. En la stacio laboras ses volontuloj, kiuj dediĉas sin al la prizorgo de la savado de handikapitaj bestoj. Kun admiro ni aplaŭdis ilian meritplenan laboron.

Vendrede ni ekskursis al la urbo Nový Jičín. Ni admiris la regulan kvadratan placon kun renesancaj domoj kaj kastelon de Žerotín. Sian junaĝon travivis ĉi tie ĉeĥa kantisto Karel Kryl, kiu komponis ĉi tie kanzonon „Frateto, fermu la pordeton“. Memortabulo informas, ke en 1790 mortis ĉi tie fama generalo Laudon.

La plej grava industri-entrepreno estas la firmao TONAK, kie oni produktas ĉapelojn. Senĉese ili eksportas ilin en la tutan mondon. En la ekspozicia halo de la firmao ni povis provi multajn ĉapelojn kaj foti nin reciproke.



Poste tra mallarĝa ŝtuparo ni fingrimpis la turon de la urbo, de kie ni admiris la tutan urbon kaj ĉirkaŭaĵon, pribriligatan de aŭtuna suno.

En la urbeto Štramberk plaĉis al ni mallarĝaj, zigzagaj stratetoj kaj ĉarmaj lignaj kaj duonlignaj dometoj. Same laodoro, fluanta el vendejetoj. Jes, fama specialaĵo „Štramberské uši“, „oreloj de Štramberk“, allogis nin al gustumado. Tra la urba placo ni venis al loka dominantaro „Trúba“ – La 40 metrojn alta turo de origina burgo, kiu nun servas kiel belvidejo. La etnaj konstruaĵoj en la urbeto Hukvaldy, kuŝanta sub la montaro Beskydy, plaĉis al ni ĉiuj. En 1854 en la malnova lernejo ĉi tie naskiĝis la ĉeĥa muzik-ĝeniulo Leoš Janáček.

Memore al la unua prezento de lia opero „Liška Bystrouška“ - Vulpino Ruzulino, staras ĝia statuo en la proksima arboparko. Onidire kiu tuŝos la oran vosteton de la vulpino kaj dezirus ion, al tiu post unu jaro plenumiĝos la deziro.

Kompreneble ĉiutage okazis instruado de Esperanto. La komencantojn gvidis instruisto el Slovakio kaj progresantojn instruistino el Hungario. Vesperajn programojn plenumis filmoj pri Brazilo, pri la pasinta 1-a Esperanto-lernejo, pri SES en la slovakia urbo Martin, ne mankis koncertoj kaj renkontiĝoj.



La pola partoprenanto rakontis pri brazila geedziĝ-ceremonio, kiun li partoprenis, alia pri siaj biciklaj vojaĝoj kun Esperanto.

La vespero kun „fraŭlino Merry“, travesti-parado, estis tre amuza kaj bele prezentita. Ŝi kantis ĉeĥe kaj esperante, dancis en brazila ritmo.

La prezentado de la kantgrupo NO PROBLEM el urbo Kostelec na Hané entuziasmigus ĉiujn ĉeestantojn. La ensemblo prezentas spiritajn kantojn jam dek jarojn ĉe plej diversaj eventoj en vasta ĉirkaŭaĵo. Ili kantis ankaŭ tri belegajn kantojn en Esperanto.

Ĝis la revido en Bartošovice!

Kompilis J.Křížková

Fotoj A. Sochacki, P. Kašćák

Skokovy

La 38-a seminario en Skokovy en Ĉeĥa Paradizo okazis de la 16-a de septembro ĝis 22-a de septembro 2013 dum iom nuba vetero en amika rondo de 17 geesperantistoj, inkluzive de geedza paro de latvoj.



La atmosfero estis laborema. Ni laboris pri la lingvo en tri grupoj, eĉ turismaj marŝoj okazis kaj matenaj kurcaj gimnastikaj ekzercoj. Ni multe eksciis pri travivaĵoj en Universala Kongreso en Rejkjaviko, kie partoprenis kvar partoprenantoj de la seminario. Vere interesa babilado, projekcio de filmoj pri Islando, fotoj, rakontado pri diversaj impresoj. En vesperoj ni dediĉis atenton al gramatiko, literaturo, bele kortuŝa estis prelego de M.Smyčka kiu enmetis kantojn, aŭ rakonto pri ĵus aperinta libro de Otokar Březina pere de Viktor Dvořák. Prelego kun diskuto kun latvino Mara estis precipe interesa. Ŝia edzo Haralds, kiu tute ne scipovis Esperanton, ekkomencis kaj estis diligenta. En merkredo ni gvidis niajn latvajjn gastojn al urbo Mnichovo Hradiště, kie nin akceptis urbestro, kiu donacis al ni etan donaceton. Kiel surprizon por la urbestro M. Smyčka prezentis nian ŝtatan himnon en Esperanto kun la preskaŭ ĝenerale neko-

nata dua strofo. Tradukojn de originalaj esperantaj verkoj pere de J. Drahotová al ĉeĥa lingvo vi povas nun akiri en elektronika formo sur la paĝoj: www.bezvydavatele.cz. Ekzemple: Život Andree Cseha, Nebezpečný jazyk, Zápisky z Íránu, Král Mates I. Reformátor, Pohádky ze všech koutů světa vám přináší esperanto, Bona Espero – vize a skutečnost, Evropou a Asií na kole a s esperantem kaj pluraj aliaj. Estus bone informi pri tio neesperantan publikon.



Post la seminario la latva paro pasigis tagon en Mladá Boleslav. Mi petis pri ia skriba konkludo en loka restoracio. Do Mara diktis al mi: „Tiu ĉi aranĝo estis la plej unua, kiun mia edzo partoprenis kaj povis konatiĝi kun ĉiuj kaj komenci lerni Esperanton. Li pensis, ke la lingvo estas malfacila, sed nun li povas kompreni kion oni diras. Mi opinias, ke li partoprenos alian aranĝon kaj lernos plu. Dum aliaj aranĝoj li sentis sin perdita, sed dum tiu ĉi aranĝo estis vera familia etoso kaj li sentis sin apartenanta al esperanta rondo familia. Tre plaĉis al li.“

Jindřiška Drahotová

UEA-ĉefdelegito raportas

En ĉi tiu lasta numero de Starto en 2013 mi iom prezentu la staton de la individua membreco de UEA flanke de la ĉefaj esperantistoj.

Mi komencu per kelkaj statistikaĵoj: En la jaro 2013 ni havis 63 individuajn membrojn de UEA (IM), inkluzive de 4 dumvivaj kaj unu honora membro, nome d-ro Josef Kavka. Komparante tion kun la jaro 2012, la evoluo estas iom ĝojiga, ĉar tiam ni havis entute nur 54 IM, do la interjara kresko estas preskaŭ 17%. Tamen, farante pli proksiman analizon ni vidas, ke baldaŭ ni devos fronti gravajn problemojn, se ni ne plijunigos niajn vicojn. Jen:

Inter niaj IM 2013 estas nur 5 membroj, kies aĝo estas ĝis 50 jaroj, 14 inter 51 kaj 60, 17 inter 61 kaj 70, 16 inter 71 kaj 80 kaj 9 pli ol 81 jaraj. Mi estas tre dankema al niaj pensiuloj, kiuj restas fidelaj al UEA kaj tre estimas ilin. Sed estas klare, ke sen membriĝo de novaj esperantistoj la mezuma aĝo pli kaj pli altiĝos.

Nun mi rigardu la membrecon en la jaro 2014 laŭ la stato al la 25-a de novembro: Jam konfirmis sian membrecon per kotizado 35 membroj, do kune kun 4 DM kaj 1 HM kaj 2 novaj membroj ni atingis la nombron 42. 23 membroj ankoraŭ ne kotizis por 2014, sed mi esperas, ke ankoraŭ tiuj renovigos sian membrecon kaj ke ankoraŭ pluraj esperantistoj decidiĝos aliĝi kaj tiel fariĝi integra parto de la plej granda kaj certe ankoraŭ plej signifa tutmonda Esperanto-asocio.

Koncerne delegitojn de UEA (inkluzive de vicdelegitoj kaj fakaj delegitoj), kiuj estis en la jaro 2013 entute 26, la

aĝdivido en procentoj similas al tiu de ĉiuj IM. Mi rememorigu al vi, ke delegito povas fariĝi ĉiu, kiu bone regas Esperanton kaj estas IM minimume dum unu antaŭa jaro. La funkcio de la delegito estas honora, do oni ne atendu iun profiton de ĝi, sed aliflanke eblas malakcepti ajnan peton, kiu postulus elspezojn de la delegito. Kaj eĉ se iu estus tro tempopostula, la delegito rajtas rifuzi tiun peton. Kaj por ke ne estu miskompreno mi aldonu: la morala devo de delegitoj ne estas loĝigi petantojn (por tiu celo ja ekzistas Pasporta Servo), nek fariĝi ĉiĉerono por eksterlandaj esperantistoj (kvankam multaj tion laŭ siaj ebloj faras pro reciproka ĝojo), sed jes oni disponigu konsilojn kaj simile.

Mi petas la jamajn individuajn membrojn konsideri la ideon, ĉu ne fariĝi ankoraŭ delegito de UEA (aŭ faka delegito pri sia fako) kaj tiujn, kiuj ankoraŭ ne estas IM, aliĝi al UEA. Post unu jaro vi povos eniri ankoraŭ la unikan delegitan reton.

Fine mi indiku la ĉefajn unuopajn kategoriojn de la individua membreco de UEA kun la indiko de la membrotizoj: MG: Membro kun Gvidlibro (la unua parto de Jarlibro sen adresoj de la delegitoj), rajtas aliri la retan revuon Esperanto — 176.- Kč

MJ: Membro kun Jarlibro, havanta aliron al la reta revuo Esperanto, rabatojn aliĝante al la UK kaj aĉetante la librojn en la libroservo de UEA — 440.- Kč

MA: Membro-abonanto, krom ĉio kiel MJ ricevas paperan version de la revuo Esperanto (11 numeroj jare) — 1100.- Kč

IM de kategorioj MJ kaj MA ĝis 29 jaroj ricevas krome oficialan organon de TEJO „Kontakto“.

Interesiĝantoj pri la partopreno de la 99-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos de la 27-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 2014 en Bonaero (*Buenos Aires*) en Argentino, petu de mi la unuan bultenon kaj aliĝilojn laŭeble tuj, ĉar la plej favora periodo por aliĝi finiĝas la 31-an de decembro (IM 135 €, ne-IM 170 €, kunulo mem IM 65 €, kunulo ne-IM 100 €).

La membroj de ĈEA povas pagi la kongreskotizon en ĉeĥaj kronoj pere de la konto de ĈEA. Tiukaze necesas pagi antaŭ la 23-a de decembro, ke estu certeco, ke la mono atingos ĝustatempe la kasiston de ĈEA.



Pro la nestabila kurzo Kč/€ ne eblas indiki la kotizojn en Kč. Vi mem kalkulu ilin laŭ www.esperanto.cz/ aŭ petu ĉe mi aŭ la kasisto Vratislav Hirš (rigardu la kolofonon).

Mi volonte respondos ajnajn pliajn demandojn pri la IM aŭ la UK.

Petro Chrdle
ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio
Anglická 878, 252 29 Dobřichovice
rete: chrdle@kava-pech.cz

Kluba vivo

Brno: La kunvenoj okazas ĉiun merkredon je la 18-a horo en nove rekonstruita klubejo (Starobrněnská 15) krom la tria merkredo en la monato, kiam la kunvenoj estas en Kohoutovice (Centrum volného času, Libušina třída 27). Por ĉiu kunveno estas preparita prelego (ekz. *Vojaĝoj tra Aŭstrio, Ĥlamidioj, Historiaj ĉevroj, Komponistino V. Kaprálová, Jan Blahoslav, LibreOffice*). Interlingvistiko estas instruata en Masaryk-universitato.

Mladá Boleslav: La lingvo estas instruata en la 6-a baza lernejo kaj en Oazo de infanoj. Membrino Eva Pánková propagandas Esperanton en sia profesia retejo www.evinatelier.cz. En la klubejo eblas tranokti (eĉ 15 personoj po 30 kronoj). La klubanoj jam enĉeĥigis librojn *Modernaj Robinzonoj* (Soros) kaj *Esplorvojaĝo* (Verne) kaj tradukas *Esperanto kaj vivo* (Samodaj). Rakonto de Blanka Hužerová *Renkontiĝo kun anĝelo de Esperanto* aperis en la retejo de *El popola Ĉinio*. Kunlabore kun Informcentro de Mladá Boleslav aperis faldfolio *Metalová stezka* (Metala pado) por gvidi turistojn tra la urbo. La klubo organizas seminariojn en Skokovy. En aprilo venis gasto el Svedio kaj en loka biblioteko estis ekspozicio *Ĉu Esperanto estas morta lingvo?*

Prostějov: La klubo sin preparas por gastigi la kongreson de ĈEA en 2014. Aperis tiutema artikolo en loka gazeto.

Svitavy: Por la 8-a de decembro 2013 la klubo preparas Marcipanan Kristnaskon kaj por septembro 2014 ekpozicion pri filatelo.

Monda Pupekspozicio 2013 en la urbo Higashikagawa

Kun la rekorda nombro de 15 000 vizitantoj finiĝis la 3-a Monda Pupekspozicio en la urbeto Higashikagawa loĝata de 32 000 personoj. Al ĝia ĉi-jara sukceso kontribuis 20 mencioj en la japanaj amaskomunikiloj kaj pliaj 30 informoj en ĵurnaloj, TV kaj radio eksterlande. Ankaŭ la turisma departemento de la kroata ambasado en Japanio, la pola kaj la argentina ambasadoj diskonigis informojn pri la ekspozicio pere de siaj hejmpaĝoj.

La ekspozicio estis ĉi-jare dediĉita al Pollando por omaĝi la naskiĝlandon de d-ro Zamenhof, kreinto de Esperanto. La pupkolekto nun kalkuliĝas je pli ol 800 pupoj vestitaj per tradiciaj kostumoj el 44 landoj kaj ĝi estis farita danke al la tutmonda Esperantistaro.

<http://www.hnt.or.jp>

*Etsuo Miyoshi
Prezidanto*

Etsuo Myoshi ricevis Ordenon de la Leviĝanta Suno

La 12an de novembro 2013 en la Imperiestra Palaco en Tokio la japana esperantisto kaj mecenato de Esperanto **Etsuo Miyoshi** ricevis la Ordenon de la Leviĝanta Suno. Ĝi estis donita al li pro la kreo de la bastonvalizo *Walkin' Bag*.

Laŭ Libera Folio

Nova redaktoro de la revuo Esperanto

La decembra numero de *Esperanto* estas la lasta, kiun redaktis Stano Marček, kiu forlasas sian postenon post 12 jaroj. La nova redaktoro estas 57-jara brazila esperantisto Fabricio Valle, kiu ĝin redaktos en sia hejmo ekde januaro 2014.



Gazetara informo de UEA

Nova direktoro de la viena muzeo

La direktoro de la Literatura Arkivo de la Aŭstria Nacia Biblioteko, privata docento doktoro **Bernhard Fetz**, transprenis je la 1-a de aŭgusto 2013 ankaŭ la direktorecon de la Kolekto por Planlingvoj kaj de la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko. En tiu funkcio li sekvas kortegan konsiliston magistron Herbert Mayer, kiu fine de julio 2013 emeritiĝis. Inter la plej gravaj evoluoj dum la oficperiodo de direktoro Mayer, ekde 1988, estas la translokiĝo de la kolekto kaj de la muzeo en la Palais Mollard, la novkonceptado de la Esperantomuzeo kaj la komenco de la ampleksaj ciferecigoj de la biblioteka kaj muzea havaĵoj.

Krome magistro Bernhard Tuidar, fakulo sur la kampo de esperantologio kaj multjara kunlaboranto, estis nomumita teamestro.

Bernhard Tuidar

Kristnaska donaco por la membroj de ĈEA

La eldonejo KAVA-PECH decidiĝis okaze de Kristnasko 2013 forte rabati prezojn de la ĉeĥaj libroj tradukitaj el Esperanto kaj de la libroj en Esperanto. La specialaj kristnaskaj prezoj validas por la membroj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio ĝis la 24-a de januaro 2014.

Tradukoj el Esperanto: Vinař: Skandál kolem Josefa - 25 Kč; Nordenstorm: Arne, syn náčelníka - 180 Kč; Blanke D.: Interlingvistika - 20 Kč; Umeda: Jak úspěšně vyjednávat s Japonci - 10 Kč; Celostní medicína a Saamova akupunktura - 150 Kč; Kurisu: Co mi dala česká literatura - 10 Kč; Sachs: Nebezpečí tropických nemocí - 10 Kč; Laube: Kulturní integrace Evropy - 15 Kč; Dobrzyński: Zamenhofova ulice - 90 Kč; Chrdlová, Malovec: překlad Baza čeĥa literaturo v angl., němč., italštině nebo ruštině - po 10 Kč

Libroj en Esperanto: Nordenstorm: Arne, la ĉefido - 75 Kč; Hašek: Aventuroj de la brava soldato Švejk - 300 Kč; Váňa: Rakontoj ne nur ŝercaj - 75 Kč, Biblio - 400 Kč, Laube: Ĉu kultura integriĝo de Eŭropo? - 15 Kč; Kiselman (red.): Esperantologio/Esperanto Studies (EES) 4 - 50 Kč; EES 5 - 70 Kč; EES 6 - 70 Kč; Pluhař a kol.: Ekoturisma vortaro - 45 Kč; Pluhař (red.): Esperanto, instrumento de fakuloj - 80 Kč, Pluhař (red.): Fakaj studoj en Esperanto: 80 Kč; Pluhař (red.): Fake pri Esperanto kaj Esperante pri Sciencoj - 80 Kč; Melichárková: Esperanto pro děti 1+2 - 100 Kč; Malovec: Gramatiko de la ĉeĥa lingvo - 10 Kč; Fiedler, Rak: Ilustrita frazeologio: 90 Kč; Chrdle (red.): Intimaj temoj en Esperanto-beletro: 70 Kč; Stampa: Ĵim la migrulo - 90 Kč;

Chrdlová (red.): Kantoj por ĝojo: 45 Kč; Chrdlová, Malovec: Baza ĉeĥa konversacio - 10 Kč; Freud: Kompendio de psikanalizo - 80 Kč; Chong: Kompleksia medicino kaj Saam-akupunkturo - 90 Kč; Rak: Desegnita humuro - 70 Kč; Pares: La afrika medicino, mirige efika - 90 Kč; Urbanová: Prefere ne tro rigardi retro - 60 Kč; Urbanová: Rapide pasis la temp' - 60 Kč; Popova: Rim-enigmoj - 50 Kč; Boito: Senso - 20 Kč; Kiselman (red.): Simpozio pri interkultura komunikado - 90 Kč; Pressburger: Taglibro de mia frato - 120 Kč; Werner: Terminologiaj konsideroj - 90 Kč; Kašparů: Kristnaskaj demandoj kaj paradoksoj - 10 Kč; Chrdle: Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj - 110 Kč.

Ostatní jazyková literatura: Brabcová: Pravopis a tvarosloví - 50 Kč; Barandovská, Schöne: Nový německý pravopis - 25 Kč; Barandovská: Latina jako mezinárodní jazyk - 25 Kč; Bavant: Les bases de l'Espéranto - 100 Kč.

Podmínky: Každý člen ČES si může koupit za výše uvedenou cenu max. 2 ks od každého titulu. Dá se kombinovat s objednávkou nezlevněných titulů. Při objednávce nad 500 Kč po odečtení DPH (tj. 575.- Kč) neúčtujeme poštovné (platí jen při poslání na adresu v ČR).

Nabídka platí do 24.1.2014!

S knihami se můžete seznámit na www.kava-pech.cz

Objednejte na adrese KAVA-PECH, Anglická 878, 25229 Dobřichovice, nebo chrdle@kava-pech.cz.

Objednávku označte „**Vánoce 2013**“

Petr Chrdle



Gravaj eldonprojekto kaj evento

La unua libro de KAVA-PECH eldonota en januaro 2014 estas tre grava el socia vidpunkto, sed ĝi ankaŭ havas intiman rilaton al Esperanto. Temas pri la ĉeĥa eldono de „Maskerado ĉirkaŭ la morto“ de Tivadar Soros, patro de la famkonata usona hungardevena filantropo Georgo Soros, verko skribita origine en Esperanto. Ĝia redaktoro, kaj por la Esperanto-eldono, kaj por la angla eldono, estis prof. Humphrey Tonkin, eksa prezidanto de UEA. Li ankaŭ restas redaktoro por la ĉeĥa eldono, por kiu li iom modifis sian ampleksan klarigan postparolon. La verkon ĉeĥigis el la Esperanto-originalo Jindřiška Drahotová, dum la preparo ankaŭ helpis (krom profesiaj kunlaborantoj de la eldonejo) Karel Votoček. Al ambaŭ mi ĉi tie esprimas publikan dankon.

La verko priskribas realajn aventurojn de la familio Soros dum la 10-monata okupacio de Hungario flanke de Germanio, la tiaman situacion de la judoj en la urbo, kaj precipe, kiel Tivadar Soros sukcesis pro sia ruzeco eskapi de la jud-neniiga maŝino gvidata de Gestapo kaj savi ne nur ĉiujn siajn familianojn, sed ankaŭ multajn samgentulojn. Kiel konfesas George Soros ekzemple en la libro „Erao de erareco“ (*Věk omylnosti*, eldonis ELK, Praha 2007), „Ĉion, kion mi atingis en la vivo, mi lernis de mia patro, kaj tion eblas ekkompreni legante lian Maskeradon ĉirkaŭ la morto“.

Mi konfesas, ke estas malmultaj lib-

roj, kiuj postlasis ĉe mi tiom profundan impreson kaj kiuj pensigis min same kiel ĉi tiu libro. Ĝi estas skribita vive, do mi legis ĝin unuspire, tamen ĝi ankaŭ riĉigis min pri multaj scioj, kiuj restis por mi ĝis tiam nekonataj.



La unua prezento de la libro al publiko en la formo de „bapto“ okazos la 10-an de februaro 2014 ekde la 16-a horo en la sidejo de JTP (Unuiĝo de interpretistoj kaj tradukistoj, *Jednota tlumočnicků a nakladatelů*), *Senovážné náměstí 23, Praha 1*. Ĝin ĉeestos krom la tradukintino J. Drahotová ankaŭ la redaktoro de la verko H. Tonkin, profesoro kaj eksa prezidanto de la Hartford-Universitato.

Jam antaŭ la evento, ekde 14:30, prelegos H. Tonkin en la angla (sen traduko) por la ĉefaj tradukistoj de la angla kaj lingvistoj pri la problemoj de tradukoj de memoraĵoj, kion li demonstros sur la ekzemploj de sia traduko de la verko de Soros el Esperanto anglan. Do, kiu komprenas la anglan, estas invitata ankaŭ al la unua tiutaga evento.


La verko estos eldonita en bel-aspekta formo kun solida bindaĵo kaj la eldonejo jam ekde nun akceptas antaŭmendojn por ĝi. Unu abonita ekzemplero kostos 200 Kč, se vi deziras ĝin donaci al viaj neesperantaj amikoj, vi povas ricevi 3 ekzemplerojn kontraŭ 500 Kč kaj ĉiun pluan libron kontraŭ 160 Kč. La supozata fina vendoprezo estos inter 350 kaj 400 Kč. La antaŭmendojn kontraŭ la indikitaj prezoj ni akceptas nur ĝis la 10-a de januaro (por ke ĝi povu montri al ni la intereson de la publiko kaj do influi la eldonkvanton de la libro).

La libro (same kiel la ceteraj libroj de la eldonejo KAVA-PECH kaj memeldonitaj libroj de Jindřiška Drahotová) estos trarigardebla (kaj aĉetebla) ankaŭ kadre de la evento. Fine de ĝi okazos publika subskribado de la libro, kiam eblos ekhavi subskribojn de ambaŭ ĉefaj agantoj (krom la forpasinta aŭtoro), nome de la redaktoro H. Tonkin kaj de la tradukintino J. Drahotová.

Petro Chrdle, chrdle@kava-pech.cz

Nová odborná publikace z Brna

„Historiaj ĉevroj“ (Historické krovy) je publikace Ing. Jana Wenera, která na 73 stranách A5 popisuje vývoj krovů od nejstarších dob do současnosti. Textem a 70ti ilustracemi sděluje, že krov není střecha (střešní plášť), že jde o svébytnou konstrukci, která dosud v esperantu neměla název (nově: ĉevro). Stručnou formou autor popisuje základní soustavy krovů (krokevní, hambalkovou, vaznicovou, vlašskou, vazníkovou, skružovou, Ardantovu) a také terminologicky systematizuje příslušné tesařské spoje: srazy, plátování, zapuštění, čepování, přeplátování, zadrápnutí a osedlání. Sepsání této příručky si vyžádalo utvoření více než 70ti nových názvů, z nichž větší část zde publikujeme. Brožuru je možno objednat u autora nebo prostřednictvím redaktora „Starta“, M. Malovce.



Historiaj ĉevroj priskribas evoluon de ĉevroj ekde plej antikvaj tempoj ĝis nia estanteco kaj solvas terminojn, kiuj ĝis nun en Esperanto mankis.

Nově navržené esperantské termíny – Nove proponataj terminoj

nosník	balko	sběžiště	konverĝopunkto
příhradový nosník	balko, trusa	krytina (<i>střechy</i>)	kovraĵo (<i>tegmenta</i>)
pásek (<i>tesařský</i>)	bendo (<i>čarpentista</i>)	prejzová krytina	imbrica kovraĵo
stolice (<i>krovu</i>)	benko (<i>de čevro</i>)	rošt (<i>nosník</i>)	kradbalko
vazník	bindoro	sraz (<i>dřev</i>)	kunpuŝo (<i>de lignoj</i>)
příhradový vazník	bindoro, trusa	svlak	kverlato
vazný trám	bindotrabo	vikýř	lukarno
prkno	breto	střešní plášť	tegmenta mantelo
průvlak, podvlak	čeftrabo	zapuštění	mergo, mergumo
krov	čevro	pozednice	murpatno
krov vlašské soustavy	čevro de itala sistemo	styčnick	[trusa] nodo
hambalkový krov	čevro, vertobalka	půdní nadezdívka	subtegmenta parapeto
námětná krokev	čevrono, stucita	okapová vaznice	gutranda patno
kamp	dentumo	věšadlo	pendigilo
odsazený (<i>prvek</i>)	dešovita	věšák	pendofosto
rozpěra	disapogilo	plát	plato (<i>če lignoligo</i>)
hmoždinka	dubelo	plátování	platumo (<i>de lignoj</i>)
hmoždík	dublo	krajín(k)a	randobreto
půdorys	grundplano	lícovat	samfaci <i>ntr</i>
okap	gutrando	řezivo	segligno
prejz <i>m</i>	imbrico (<i>speco de tegolo</i>)	omítané (hraněné) řezivo	randumita segligno
tesařská vazba, tesařský spoj	lignoligo (inter-ligo) čarpentista	osedlání	selumo
ostřih	forka interligo	solitér (<i>dům</i>)	solitero (<i>domo</i>)
styčnickový spoj	noda interligo	rozpětí, rozpon	spano, spanlongo
spára	junto	trakt	spanspaco
ležatá stolice	klinbenko	zavětrovat	ventostabiligi
spádnice	klinlinio	stojatá stolice	starbenko
námětek	klinpeco	kleština (<i>krovu</i>)	stego (<i>de čevro</i>)
konstrukce	konstrukto	krátče	stumpotrabo
vzpěradlo	subštrebilo	plná vazba	plena truso
vzpínadlo	substrečilo	prázdná vazba	simpla truso
bačkora (<i>u krovu</i>)	ŝuo (<i>de klinbenko</i>)	zadrápnutí	ungumo
zborcená střecha	ebentordita tegmento	úžlabní krokev	valčevrono
plochá střecha	plata tegmento	úžlabí (<i>střešní</i>)	valo (<i>tegmenta</i>)
strop	tekto	hrotnice	vertaĵo
čepování	tenonumo	hambalek	vertobalko
přeplátování	transplatumo	výměna	vicbalko
vazba krovu	truso (<i>tegmenta</i>)		

La libro estis prezentita la 21-an de novembro 2013 en Societo por la internacia lingvo Esperanto en Brno.

KOMENIUS - ZAMENHOF

La Vojo al Harmonio

Jaroslav Karhan (daŭrigo)

Zamenhof, kiu timis publikon, ankoraŭ neniam parolis en iu kolektiĝo de homoj – faris inaŭguran prelegon, en kiu li i.a. diris: «Sankta estas por ni la hodiaŭa tago. Modesta estas nia kunveno; la mondo ekstera ne multe scias pri ĝi... ĉar ne kunvenis regnestroj por ŝanĝi la politikan mapon de la mondo... sed io granda ĉi tie naskiĝas... La unuan fojon la revo de miljaroj komencas realiĝi... Kunvenis homoj el la plej diversaj landoj kaj nacioj kaj ili renkontiĝas reciproke ne mute kaj surde, sed ili komprenas unu la alian kiel fratoj, kiel membroj de unu familio...

Ni kunvenas hodiaŭ por montri al la tuta mondo, per faktoj nerefuteblaj tion, kion la mondo ĝis nun ne volis kredi. Ni montros al la mondo, ke reciproka interkompreniĝado inter personoj de malsamaj nacioj estas tute bone atingebla, ke por ĉi tio tute ne estas necese, ke unu popolo humiligu aŭ englutu la alian, ke la muroj inter popoloj tute ne estas io necesega kaj eterna, ke reciproka kompreniĝado inter kreitaĵoj de tiu sama speco estas ne ia fantazia revo, sed afero tute natura...»

Li dankis ankaŭ al la Plej Alta Forto, kiun ĉiu ĉeestanto alie al si prezentas, sed kiun ni ĉiuj same konscias. Fine li deklamis sian poemon «Preĝo sub la verda standardo», en kiu li petas benon por malfacila laboro cele pacon inter nacioj.

La parolado de Zamenhof kaj la nobla poemo – preĝo – profunde tuŝis korojn

de la ĉeestantoj. Longdaŭra aplaŭdo ektondris en la kunvenejo. Zamenhof vidis kaj aŭdis, ke esperantistoj el plej diversaj nacioj komprenis liajn vortojn, ke liaj amo kaj sopiro helpi al la tuthomara interkompreniĝo estis komprenitaj.

La kongreso ĝoje daŭris. Estis kreita fundamento por gravaj reguloj, necesaj por mondorganizaĵo de la Esperantomovado kaj decidite, ke insigno de Esperanto estas kvinpinta stelo – simbolo de espero en interkompreniĝo de ĉiuj kvin mondpartoj. La himno de esperantistoj fariĝis la muzikigita poemo de Zamenhof – «La Espero».

Post tiu ĉi 1-a Universala Kongreso de Esperanto, Zamenhof revenis al Varsovio por kuraci siajn malsanulojn kaj por preparado de pluaj kuraciloj, cele sanigi vivon de la tuthomara socio. La Kongreso – en miniatura skalo kaj kvaŭzaŭ laboratoria medio – realigis ideon de la esperantista himno: ĉiuj nacioj kreu unu grandan familian komunumon.

Sed Zamenhof plene konsciis, ke por realigi tiun ideon mondscale, necesas multe pli: analoge kiel la magneta montrilo en kompasoj trankviliĝas nur, se ĝi povas spontane turniĝi al la norda poluso, same la homaro atingos plenan harmonion kaj pacon nur tiam, kiam ĝi trovos komunan firman punkton kaj **ĉiuj** homoj spontane direktos siajn pensojn al sia komuna Fonto de Vivo – nomata grandparte Dio – lumturo en mallumo kaj kaoso.

Tasko ege malfacila, se ne malebla. Kaj Zamenhof ĉiam akcentadis la vorton **ĉiuj**. Tial li ĉiam serĉis solvojn simplajn kaj universalajn, por ke ili povu esti akceptitaj de **ĉiuj** homoj.

(daŭrigota)

Jaroslav Mařík

22.12.1913 – 5.5.1997

Pasis cent jaroj de-
post la naskiĝo de
Jaroslav Mařík, ne-
lacigebla laboranto
por Esperanto sur
diversaj kampoj, ki-
es personeco eniris
historion ne nur de
la enlanda, sed an-
kaŭ monda Esperan-
to-movado. Li estis respektata prilingva
fakulo, kiu dum sia tuta vivo konscienc-
e poluris sian lingvouzon. Li estis altnivela
tradukanto de fakaj kaj artismaj tekstoj,
eksterordinara konanto de E-historio kaj
literaturo, modela prononcanto de la
lingvo, sperta defendanto de nia afero
kaj lerta aŭtoro de grandaj priesperantaj
eseoj.



Jaroslav Mařík naskiĝis la 22-an de
decembro 1913 en Zahradnice (distrikto
Benešov, Ĉeĥoslovakio). Li frekventis
8-jaran real-gimnazion kun abiturienta
diplomo „eminente“. Sekvis 4 semestroj
en Karlo-Universitato en Prago (fakul-
tato pri juro). Dum la jaroj 1936-1938 li
soldatservis: lernejo por rezerv-oficiroj;
kursaro por komandantoj de telekomuni-
kaj plotonoj. Atingita rango: leŭtenanto
(1945) kaj kapitano (1969).

Dum la germana okupacio li frekventis
komercan kursaron kaj en privata lernejo
studis germanan kaj anglan lingvojn.
Plie li studis en ministeria kursaro por
teknikistoj de la patent-juro, speciale pri
la usona patent-juro.

Li interesiĝis kaj studis pri fremdaj
lingvoj: latina, franca, germana, angla,
rusa (parte). Private: Esperanta (vidu

aldonan tekston je la fino de la artikolo)
kaj Esperanto (ekde 1934, memlernanto).

Dum la germana okupacio (1940-
1945) li laboris kiel oficisto. 1946-1950,
ĝis likvido de Esperanto en la radio, li
estis redakciano de la ĉiutagaj Esperanto-
elsendoj de la Ĉeĥoslovaka Radio en
Prago, tradukisto kaj profesia parolisto,
komentanto pri la Esperanto-movado kaj
pri sporto, aktive laboris en la art-
programoj „La Verda Stacio“.

1950-60 ĉefo de propaganda grafika
ateliero kun verkado de inform-artikoloj
por la gazetaro. 1960-1974 teknikisto de
patent-jura fako de Agromaŝina Esplor-
instituto en Prago. Esploroj en la monda
patentaro, ellaborado de raportoj pri la
patentjura stato de planitaj konstruaciaj
taskoj ktp. Ekde 1974 emerito.

Post sia esperantiĝo (21.11.1934) li
aktivis en pluraj funkcioj. Jen la resumo:
membro de Esperanto-Asocio de Ĉeĥo-
slovaka Respubliko (EAĈSR, ekde
1935), vickomitato kaj estro de Gaze-
tara servo de EAĈSR (ekde 1939 ĝis
okupacia likvido 1941-1945). Komitata-
no de EAĈSR de post 1948. Membro de
Lingva komisiono de EAĈSR (1948).
Ĝenerala sekretario de EAĈSR (1948-
1952). Komitato A de UEA (1950-51).
Ĉefdelegito de la Esperanto-Junularo
(1955-57) kaj Junular-sekciestro de Tut-
ŝtata Konsulta Komisiono Esperantista
(TKKE), redaktanto de landa junulara
bulteno „Tagiĝo“ (1957).

1968-1969 prezidanto de la Preparko-
mitato de Ĉeĥa-Esperanto-Asocio; 1969-
01-27 li transprenis en la Ministerio de
internaj aferoj la aprobitan statuson por
lanĉi Ĉeĥan Esperanto-Asocion.


Honora Membro de ĈEA kaj UEA.

Vlastimil Novobilský

Štěpán (Štefo) Urban

(4.10.1913 – 4.5.1974)

Pasis cent jaroj ankaŭ de post la naskiĝo de Štěpán Urban, gitar-virtuozo, muzik-



pedagogo, komponisto, fondinto de la memstara gitarluda klaso en la Praga Konservatorio, astrologo, antropozofa, Esperanta poeto kaj verkisto.

Štěpán Urban naskiĝis la 4-an de oktobro 1913 en la vilaĝo Bořanovice apud Prago. (En la internacia medio oni uzis lian baptonomon en formo “Štefo”.) Lia patro, Jan Urban, estis instruisto kaj poste muzikpedagogo kaj komponisto. Dum kelkaj generacioj disvolvidis sin en tiu familio instruista profesio kaj muziko. La juna Štefo studis en la Praga konservatorio. Ĝi povis tiam fieri pro siaj profesoroj, majstroj Josef Suk, J. B. Foerster k.a. En la jaro 1936 Urban finis la studojn en la fakoj blov-instrumenta kaj komponada, en 1938 li fariĝis la unua kaj la sola frekventinto de la gitarluda fakoj en Ĉeĥoslovakio.

De la jaro 1939 li estis profesoro de la Praga konservatorio. Urban iom post iom kreskis al respektata gitar-virtuozo, sukcesa muzikkomponisto, pedagogo kaj verkisto de fakaj publikaĵoj. Tiuj karakterizaĵoj fine gvidis al fondo de memstara konservatoria gitarluda klaso.

La gitarluda klaso estis granda sukceso atingita pro riĉaj rezultoj de la profesoro mem kaj liaj gestudentoj. Plua evolua ŝtupo estis atingita en 1982, kiam la mondkonata gitaristo Štěpán Rak, iama studento de Štefo Urban, sukcesis fondi memstaran gitarsekcion ĉe la muzik-

akademio en Prago, plenumante tiel revon de sia instruisto.

Urban estis persono de multflanka aktiveco. Krom la muzika kreado, speciale por gitaro, estas konata ankaŭ lia verkado literatura. Li akiris kelkajn superajn premiojn en internaciaj konkursoj pro siaj verkoj en Esperanto.

Grava kontribuo lia por Esperanto estas kantoj laŭ tekstoj de famaj Esperanto-poetoj el pluraj landoj. Krom tio li verkis aron da rakontoj kaj poemoj. En 1961 Stafeto (Kanariaj insuloj) eldonis lian libron de satiraj, spicaj kaj saĝaj versoj Nova Ezopo.

Urban ŝatis sian verkadon. Al la pedagogia laboro li dediĉis sin intense ĝis sia vivofino. Li edukis aron de muzik-interpretistoj kaj liaj gelernantoj akiradis unuajn premiojn por la tiama Ĉeĥoslovakio dum internaciaj gitar-konkursoj en Vieno, Parizo kaj Moskvo.


Mi aldonu kelkaj vortoj pri lia privata vivo. Ankaŭ lia unua edzino Eliška (Eli) Urbanová estis Esperanta poetino internacie rekonata. En la jaro 1954 la paro disiris. En 1956 li trovis novan edzinon, sian studentinon Jaroslava, kiu akceptis nomon Urbanová. Ŝi akompanis lin ĝis lia vivofino.

Urban estis ankaŭ astrologo, kiu starigis centojn da horoskopoj. Tiu ĉi lia aktiveco, pri kiu li eĉ malkaŝe parolis, ne estis kongrua kun la komunista ideologio tiam en Ĉeĥoslovakio reganta kaj direktoro de la konservatorio nuligis lian laborkontrakton. Post longa kaj komplika traktado en oficoj Urban fine venkis la problemojn kaj povis resti kiel profesoro en la konservatorio kun siaj ŝatataj studentoj.

Vlastimil Novobilský

Jubileoj

Antaŭ 85 jaroj naskiĝis artisto **Jiří Harcuba** (6.12.1928), kiu bedaŭrinde ne ĝisvivis sian jubileon forpasinte ĉi-somere (26.7.2013). Li estas konata kiel aŭtoro de kvinkrona monero kaj de multaj reliefaj portretoj de famuloj. Li estis membro de nia asocio kaj kreis ankaŭ medalon kun Esperanta temo.




Jam pasis 10 jaroj post morto de la honora membro de ĈEA **Drahomír Kočvara** (20.10.2003), funkciulo kun laŭta kaj bonhumora oratora voĉo, kolektanto de E-monumentoj en nia lando.

Sian 80-jariĝon festos honora membro de ĈEA **Pavel Sittauer** (1.1.1934), iniciatinto kaj gvidanto de E-tendaro en Lančov, danke al kiu estis riĉigita ankaŭ nia literaturo, kvankam de aliaj aŭtoroj (*ABC de Esperanto*, *La mondo rakontas*, *Historio kaj biografioj*, *Gramatiko de Esperanto*, *Ondro kaj drako*, *Knaboj de Kastora rivero*).




La saman jubileon festas ankaŭ **Jaroslava Hamajdová** (15.1.), kiu kontribuas ne nur al Dio Benu, sed ankaŭ al gazetaro en Zruč nad Sázavou. Ŝi ankaŭ zorgis pri rekonstruo de la loka kastelo, pri rekonstruo de preĝejo en Zahrádka u Ledče, kunlaboris kun verkisto Miloš Doležal pri libro koncerne miraklon en Čihošť, ŝi aperis en filmo pri valbaraĵo Ŝelivka kaj helpas al malsanaj maljunuloj.



Honora membrino de ĈEA **Jindřiška Drahotová** (25.11.1938) estas konata precipe pro siaj tradukoj el Esperanto en la ĉeĥan kaj pro aranĝado de seminarioj en Skokovy. Pri ambaŭ vi povas legi ankaŭ en ĉi tiu numero. Ŝi ankaŭ prizorgis memortabulon omaĝe al d-ro Josef Hradil, gvidas klubon en Mnichovo Hradiště-Mladá Boleslav, instruis Esperanton al gimnazianoj.



Sian 70-jariĝon atingas **Josef Vojáček** (18.12.1943) el Brno, kiu jam plurajn jarojn sukcese instruas Esperanton kaj interlingvistikon al studentoj de Masaryk-universitato, ne nur kiel hobion, sed kiel elekteblan instruobjekton. Li ankaŭ verkis studon pri duonaŭtomata tekstrotradukado, prizorgis plurajn ekspoziciojn pri Esperanto en Brno, plurfoje jam parolis en televido kaj radio, liaj artikoloj aperis en ĉeĥa gazetaro. Lia studentino Tereza Hujberová verkis bakalaŭran laboron pri la temo *Umělé jazyky se zaměřením na esperanto* (Artefaritaj lingvoj kun fokusiĝo al Esperanto).



60 jarojn atingis la redaktoro de Starto **Miroslav Malovec** (8.12.1953).

Konkurso de infan-desegnoj

Temo: *Marŝo kontraŭ malegalecoj kaj rasismo*. Formato minimume 30x30 cm. Limdato: la 1-an de marto 2014.

Dorse de la desegnaĵo notu, **esperantlingve**, nomon, aĝon de la infano, adreson de la lernejo aŭ de la E-klubo, **kaj sur la desegnaĵo skribu mesaĝon pri la temo por la tuta mondo!**

Bonvolu sendi desegnaĵojn al:
Centre culturel St Nazaire Esperanto, 38, rue de la Croix Fraîche, 44600 Saint Nazaire, France

KALENDARO 2014

- 2014-01-04/06 32-a renkonto en Poludnica
Info: www.poludnica.esperanto.sk
- 2014-04-30/-05-04 Bibliaj Tagoj en Tuchoměřice u Prahy,
Info: stefanlepping@gmx.de
- 2014-05-12/18 Seminario en Skokovy
Info: drahotova@esperanto.cz, tel. 720 652 320
- 2014-05-15/18 La 9-a Sabla Printempo en Skokovy,
Info: pisek@esperanto.cz
- 2014-06/15 Grimpado al Granda Ĉantorio
Info: leontodo@centrum.cz
- 2014-09-12/14 Renkontiĝo de ĉeĥa IKUE-sekcio en Svatý Kopeček ĉe Olomouc,
Info: m.svacek@seznam.cz
- 2014-09/ 13 aŭ 20 Postferia Renkontiĝo en Strž apud Dobříš (laŭ dato de Festo de falanta foliaro),
Info: pisek@esperanto.cz
- 2014-09-27/28 Inaŭguro de la ekspozicio "Esperanto kaj kolektado", Tutŝtata filatela ekspozicio + Kleriga dimanĉo en Svitavy,
Info: svitavy@esperanto.cz
- 2014-10-9/12 La 3-a Internacia Esperanto-Lernejo en Bartošovice
Info: verdestacio@gmail.com
- 2014-10-24/26 ĈEA-Kongreso en Prostějov
Info: cea@esperanto.cz
- 2014-11-29 Antaŭkristnaska Renkontiĝo en Písek,
Info: pisek@esperanto.cz
- 2014-12-13 Marcipana Kristnasko en Svitavy
Info: svitavy@esperanto.cz
- Datoj de pluaj aranĝoj aperos en Starto 2014/1.

MIGRA EKSPOZICIO

"Ĉu Esperanto estas morta lingvo?" okazos en januaro 2014 en HAVÍŘOV.

2.-10.1. en Galerio Maryčka, Hlavní třída 31a (dum labortagoj 14-18, alitempe laŭ peto en la informejo).

12.-31.1. en Kulturdomo Leoš Janáček, Dlouhá třída 1593/46 (dum labortagoj 8-20h, dum semajnfino 14-18h). Loka organizanto: Zdeněk Heiser, zd.heiser@post.cz.

PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kun Radojica Petrović kaj Christophe Chazarein kaj internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1).

2014-04-26/05-04

<http://gresillon.org/printempo>
Kontakto: kastelo@gresillon.org

Ni kondolendas

- la 8-an de aŭgusto 2013 forpasis **ing. Jan Šafr** (nask. 1943) el Praha

- la 27-an de septembro 2013 mortis **Karel**



Bartošík, filo de fama esperantisto kaj desegnisto Adolf Bartošík (portreto de Zamenhof). Li mem (71-jara) estis aprezata

juvelisto, vivanta en Londono. En 2010 li havis grandan ekspozicion de juveloj en Slováké muzeum Uherské Hradiště. Somere 2011 li vizitis ankaŭ nian muzeon en Svitavy (foto kun la edzino).

- la 9-an de oktobro 2013 mortis **Josef Filip** (74-jara) el Chropyně, konata inter amikoj kiel



Míša. Li instruis en Lančov, prizorgis magnetofonan servon de la asocio, kunredaktis Informilon de AEH. Populara pro sia humuro.

- la 4-an de novembro 2013 forpasis verkistino kaj akademianino **Lena**

Karpunina (51-jara), rusino loĝanta en Germanio

- la 5-an de novembro 2013 mortis **Daniel Luez** (88-jara), kiu esperantigis komisaron Maigret de Georges Simenon.

- la 21-an de novembro 2013 forpasis **Rüdiger Sachs (86-jara)**, parazitologo, multjara prezidanto de ISAE kaj redaktoro de



Scienca Revuo, ofta partoprenanto de KAEST-oj en Ĉeĥio, kie liaj prelegoj estis tre popularaj pro tre vigla prezento (foto el KAEST 2004).

Ĉestmír Vidman

(1921-2013)

- la 18-an de oktobro 2013 forpasis la ĉeĥa poeto kaj esperantisto **Ĉestmír Vidman** (92-jara), honora membro de ĈEA, aŭtoro de multaj (ĉeĥlingvaj) poeziaj libroj kaj dramoj (Kvar ĉeĥaj reĝinoj, Tri bardoj, Antaŭ ol la nebulo plene falos, Ludo nomata vivo ktp.). En Esperanto aperis liaj verkoj en traduko de J. Krolupper (Kun pligrimbastono, Dek sep silaboj, Karesa fantazio).



Jak platit svazu

Pozor, změna účtu!

Nyní Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 22 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vr. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:

(ukončení variabilního symbolu)

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio
- 80500** virtuální *adresa@esperanto.cz*

Pozor!

Změna předplatného časopisů!

Vzhledem k výrazné změně kursu koruny došlo k úpravě předplatného.

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. **311 241 406**, e-mail: polnickypavel@seznam.cz. Předplatné uhradíte na účet u Poštovní spořitelny v Poděbradech, č. ú. 231 798 902/ 0300, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 1200,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 670,-Kč
La Gazeto: 600,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

La Ondo de Esperanto: 620,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4, reta versio 340,- Kč.

Juna Amiko: 310,- Kč, v.s. 07004, 3 čísla ročně, 50 stran formátu A5
Literatura Foiro: 1240,- Kč (*830,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5

Femina: 830,- Kč (*550,- Kč), v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4

Heroldo de Esperanto: 1320,- Kč (*900,- Kč), v.s.07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A3
(vydávání HdE není zcela pravidelné!!!)

*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".

**Periodikum Českého
esperantského svazu - 44. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

malovec@volny.cz

<http://members.chello.cz/malovec/>

**Předplatné v Česku (bez členství ve
svazu): 200 Kč**

Členská evidence a změny adres:

**p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,
683 04 Drnovice, vhirsx@email.cz, tel.
517 444 117**

Uzávěrka příštího čísla: 1.2.2013

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
- - 43-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj
aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 11 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj**

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

**Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

Ĉeĥio, malovec@volny.cz

<http://members.chello.cz/malovec/>

Presis: DTP centrum, Svitavy

**Redakto-fermo de la sekva numero:
1.2.2014**

ISSN 1212-009X

Anonima, sed dankinda donaco por ĈEA

En novembro 2013 aperis sur ĈEA-konto alta sumo de 20.000 Kč kiel donaco, pri kies uzado la estraro libere decidu. La donacinto estas al la estraro konata, sed la persono deziras resti anonima. Mi do skribis al li persone kaj volas informi niajn membrojn almenaŭ tiamaniere en Starto, por ke ĉiu membro sciu pri tia laŭdinda fakto, kiu helpos al nia agado kaj aperos en niaj ekonomiaj statistikoj por 2013. Des pli bone estas, ke temas pri nia propra membro. Por parteto de la monsumo ĈEA jam aĉetis aparaton por enplastigado, kiu helpos en nia muzea aktivado kaj por la asociaj legitimiloj. En la nomo de ĈEA dankas Vladimír Dvořák, prezidanto

Strategia laborplano de UEA 2013-2017

Konsciigo – Atingi, ke la homoj de baza klereco (7-a klaso) sciu kernajn faktojn pri Esperanto; plibonigi publikan bildon de Esperanto

Kapabligo – Disponigi bazajn lernilojn por ĉiu interesato

Komunumo – Kreskigi la uzadon de Esperanto por ĉiuspecaj celoj.

Kunordigo – Kunligi ĉiujn esperantis-tojn kaj ĉiujn landajn kaj regionajn organiza-zojn en unu fortika tutmonda movado.

Detala laborplano:

http://www.uea.org/pdf/Strategia_laborplano_de_UEA_2013-2017.pdf



Aŭtuna seminario en Skokovy 2013



Partoprenantoj de soleno en Svitavy



Unua premio en tombolo de la konferenco en Nymburk – fazano, kiun gajnis V. Hirsch



Muzika grupo NO PROBLEM kantis esperantlingve al kursanoj en Bartošovice



Inaŭguro de ekspozicio en Svitavy



Kursanoj de Bartošovice antaŭ la monumento de Vulpino Ruzulino el la opero de Leoš Janáček

Fotoj: J. Drahotová, P. Dvořáková, P. Kaščák